2-a Jaro, N-o 27 (79)

APERAS S.A.T. SEMAJNE

1. Aprilo 1926

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Sidejo de la Redakci-Komisiono: Colmstrasse 1, Leipzig O 27 (Germanio) | Sidejo de Ekzekutiva Komisiono de SAT 23, rue Boyer, Paris XX | Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig O 27

Konferenco por malpliigo de la armiloj

Sep jaroj nun estas pasintaj depost la interpopola buĉado, kaj senĉese la venkintaj ŝtatoj estas laborantaj por kiel eble plej perfektigi la mortigilojn, kaj senarmigi la ŝtatojn Germanio, Aŭstrio, Bulgario kaj Hungario. Ĉi tiu fervora fabrikado de armiloj tute kontraŭas la statutojn de la Ligo de Nacioj, kvankam ĝi estis kreita de ili. Ne nur en la nove fonditaj ŝtatoj novaj armeoj estas starigitaj, ankaŭ en la grandaj imperialistaj ŝtatoj la samo estas konstatebla. Ĉiuj provoj malmultigi la armadon restis surpaperaj.

Hodiaŭ nun estas konstatebla, ke la diversaj registaroj, kiuj preparas ĉiujn kruelaĵojn de la gasmilito, klopodas vivigi konferencon, celantan la malpliigon de armiloj. Aŭdante tion ni devas demandi nin, kio kaŭzis la subitan ideŝanĝon. Solvon ni trovas, se ni rigardas la gravajn financkrizojn, kiuj regas nun en la diversaj ŝtatoj. Pro ĉi tiuj krizoj al ili ne estas eble plenumi eĉ la plej etajn socialajn problemojn. Kaŭze de tio ili estas devigataj iomete koketi kun la ideo de senarmigo parteca, des pli ĉar ja la pacifista hipokriteco estas eminenta armilo de ĉiuj burĝaj registaroj. Krom tio neniu ŝtato malakceptus la senarmigon de alia.

Plej grandan intereson tiu-sence havas Ameriko. Ĝi estas la plej forta ŝtato nuntempe. Pro tio la tendenco de la amerikaj potenculoj estas, malgravigi la eŭropan armilnombron. Se Ameriko same kiel la aliaj malmultigas armilaron, ĝi tamen restus la plej forta potenco, ĉar ili posedas la plej progreseman industrion, kiuj ebligas preskaŭ tujan renovigon de la militiloj. Tion ni ja bone spertis dum la pasinta mondmilito. La supereco de Usono pli eminentiĝus ankoraŭ, se la militarista bando forlasus siajn tradiciojn, kaj preferus la industrian militon. La deziro de la unuigitaj ŝtatoj malpliigi armiladon sendube estas netrompa, ĉar ili ja posedas grandan potencon kaj tio estas la fame konataj doloroj. Ameriko estas la akuŝistino de la konferenco. La amerikaj bankpotenculoj intencis, kiel taktikuloj, limigi la senarmigon sur landarmeoj. Pro la vulkana situacio en la ekstrema oriento, malpliigo de ŝiparo ne estas konvena al ili. La financa supereco de Ameriko devigis Anglion kaj Francion obei al la granda frato kaj konsenti partoprenon de la konferenco. Pro la premo de ĝi, Ligo de Nacioj estis devigita fiksi daton kaj aranĝon de la konferenco. Ĝi devas okazi fine de 1926 aŭ komence de 1927. Antaŭe jam estas planitaj preparkonferencoj, kiuj devas zorgi kaj akceli unuecon, por ke la planita konferenco povu okazi je fiksita tempo. Ni vidas, ke Ameriko starigis sian propran teorion, nun Francio.

Same kiel Ameriko, ankaŭ Francio havas propran teorion. Francio alcelas pligrandigi sian soldataron kaj la soldataron de siaj vasaloj. Finance nuntempe ĝi troviĝas en ega mizera stato, tamen la francaj generaloj sopiras al la tempo, kiam la financkrizo apartenas al la estinteco, kaj denove povas pagi la armadon de Francio Polio kaj Ĉekoslovakio. Pro tio Francio ne toleras komparon kun la relative malgranda soldatnombro de Anglio. Ili bone scias, ke Anglio en nepra okazo povas armi grandan armeon kaj krom tio Anglio povas helpi armadon en Germanio, kiu posedas potencan kemian industrion kaj metalurgion.

Anglio kompreneble prezentas alian starpunkton. Ili deziras, ke la popolnombro kaj la teritorio, kiu eventuale devas esti defendota, formu la fundon de la juĝo kiom da armiloj estis destinotaj al la diversaj landoj. Tio signifas: La angla imperio pro ĝia vasteco devos ricevi la plej multajn armilojn por povi defendi ĝin. Iom la anglaj potenculoj povas cedi, se Francio nuligus la submarajn militŝipojn, ĉar tiam ili bezonus tiom da ŝipoj.

Sekve ni vidas en ĉi tiu demando nur nesolveblajn kontrastojn, nesolveblaj pro tio, ĉar la imperialistaj potencoj tute ne havas la volon nuligi ilin.

Kiam oni efektivigis la senarmigon de la supre cititaj ŝtatoj la afero rapide ordiĝis. Laŭ la packontrakto la armeo de Germanio estis malmultigita ĝis 100 000 soldatoj, peza artilerio likvidita ktp. Kaj hodiaŭ? Oni subite ne plu scias kion oni devas kompreni sub la vorto senarmigo. Oni debatas, ĉu ekzistas defensiva kaj ofensiva armado, kiajn regulojn oni devas apliki por la diversaj landoj. Ĉu ĝi valoras por milito aŭ ne. Per tiaj eldiraĵoj la pacifista vualo estas fortirita, kaj montriĝas la vera vizaĝo de la konferenco, nome, ke ĝi estas arlekenado, monstro, aranĝita nur por trompi kaj trankviligi la popolojn, kiuj suferas sub mizeraj cirkonstancoj, kaj ĉefe por povi plu senĝene armadi por venonta milito.

Ni ja spertis, ke, ju pli granda estas la pacifistaj paroloj, des pli proksima estas la danĝero de nova milito. Pri malmultigo de armiloj oni parolas en la

teorio, praktike tondras jam la kanonoj. Ne je la paroloj, sed je la agoj oni ekkonas veran intencon de la tiel nomitaj popolamikoj.

La proletoj de ĉiuj landoj devas unuiĝi por ĵeti abismen imperialismon kaj kun ili aŭtomate malaperiĝos militdanĝero. Tiom longe kiel ekzistas kapitalismo, milita danĝero restas akuta. Ni enkorigu tion kaj agu laŭ tio.

Maŝinaro en Industrio

Novaj maŝinoj, por igi la laborpovon pli fruktodona, konstante estas eltrovataj kaj aplikataj. Tiu neĉesanta enkonduko de maŝinaro havas la rezulton, ĉiam malpliigi la nombron de la laboristoj, bezonataj por produkti saman kvanton da riĉaĵo. Kaj ĉar ĉiu plibonigo de maŝinaro samtempe pliigas la diferencon inter tio kion produktas la laboristo kaj tio, kion li reaĉetas, (ĉar lia produkto pliiĝas dum lia salajro restas la sama) la rezulto estas, ke la profito de la labordonantoj kreskadas, dum la salajro restadas la sama, kaj sekve la laboristoj trovas, ke ilia laborforto estas nevendebla. Tiamaniere pli bonaj maŝinoj kaj metodoj helpas pligrandigi la armeon de senlaboruloj.

Ekz. en Ameriko la produktado en la aŭtomobilindustrio de ĉiu homo laboranta pliiĝis dekoble en 24 jaroj depost 1899. La jenaj ciferoj estis preparitaj de Dept. de laboro de Usono.

	Aŭtomobiloj produktitaj	Aŭtomobiloj po laboristo
1899	3,723	1,66
1904	21,692	1,80
1909	126,570	2,47
1914	568,781	7,17
1919	1,888,059	8,97
1921	1,602,336	11,15
1923	3,890,134	16,11

La sama progreso okazis en la konstruindustrio en Anglio. Laŭ enketo en marto 1925 iu gvidanto de la konstruista sindikato deklaris, ke en 1914, la 73761 brikmetiistoj en la lando uzis 3000 mln. da brikoj en 1924, 57170 brikmetiistoj uzis 2000 mln. da brikoj pli.

S-ro J. J. Davies sekretario de la usona dept. de laboro montris en 1923, ke multaj le la ĉefindustrioj en Usono estis tiom tro evoluintaj dum la milito, ke oni povas fari nenion por pravigi ilian plentempan funkcion en pacperioda produktado, ĉar tiu produktado ne povas esti vendata nek hejme nek nuntempe alilande.

La karbindustrio povas produkti duoble pli ol Ameriko bezonas; la fer- kaj ŝtalindustrio povas kontentigi ĉiujn bezonojn en sep el la dekdu monatoj, kaj se la maŝinaro estus igita kiom eble plej efikplena, oni povus daŭrigi la produktadon per triono de la laboro. Per la plej ĝisdataj maŝinoj 5000 viroj povus fabriki sufiĉajn brikojn por la tuta lando (Anglio) anstataŭ la 33000 nun ne plenefike dungataj. En 15 ĉefaj amerikaj industrioj la salajra nivelo de la laboristoj daŭre malpliiĝis depost 1896: inter 1896 ĝis 1907 laŭ ses procentoj. Kaj dum ĉiuj dudek kvar jaroj ĝis 1920 laŭ preskaŭ 25 procentoj. Laŭ la usona cenzuro de fabrikistoj 1905 de ĉiuj laboristoj estis okupataj 71,6% en nur 11,2 laborejoj kaj fabrikis 79,3 de ĉiuj produktoj. La ceteraj 28,4% laboristoj laborantaj en malgrandaj laborejoj fabrikis nur 20,7% de la produktaĵoj. Dum kaj post la lasta mondmilito tiu koncentriĝo de industrio atingis eĉ pli perfektan gradon. Pro la pliigo de produktaĵoj ne estas laboristoj, kiuj akiras pli da komforto, kontraŭe estas ili, kiuj plej suferas pro la rezultanta senlaboreco.

J. Floro (3398).

Terura burĝa krimo en Polio

Antaŭ kelkaj cent jaroj, kiam la cara registaro gvidis en okupita parto de Polio sovaĝan batalon, okazis terura incidento en vilaĝo Kroĵe en distrikto Ĥelm. Estis forprenota la preĝejo de katolika loĝantaro, por ke ĝi estu interŝanĝota je grekoorienta cerkvo (preĝejo). Amasoj da loĝantaro sendefenda ŝirmis la aliron al preĝejo per nuda brusto. La kozakaj ekzekutistoj forpelis la amason pikinte ĝin per lancoj kaj ekposedis la preĝejon. Estis kelkdekoj da personoj vunditaj. Sciigo pri tiu ĉi barbara incidento ĉirkaŭkuris tutan landon. Ĉagreno disŝiris la korojn de polaj patriotoj. Okazadis diservoj — demonstracioj. Lamentoj flugis tra tuta mondo vekinte kompaton de ĉiu civilizita homo. La kroĵa krimo fariĝis inspirfonto de polaj poetoj, verkistoj kaj pentristoj.

Tiel estis — kaj kiel estas unu.

Antaŭ kelkaj jaroj la loĝantaro de vilaĝo Jastkov apud Rozvadov transiris al la nacia eklezio. (Kristana sekto-disvastigita inter pola proletaro kaj defendanta ĝiajn aferojn — ne rekonanta la papon, uzanta polan lingvon anstataŭ latinan ĉe diservo, apoganta sin sur evangelio.) En preĝejo, konstruita je ilia elspezo, preĝadis la kvietaj vilaĝanoj ne malhelpante iujn ajn. Katolika klero fortigita lastatempe per la konkordato (traktato inter la papo kaj iu registaro) ekdeziris disrompi la sektan antaŭpostenon. — La 23. dec. p. j. enmarŝis al Jastkov 3 taĉmentoj da policistoj po 40 homoj. La loĝantaro enfermiĝis en preĝejo. Post tuttaga sieĝado enpuŝis sin la policistoj en la preĝejon kaj ĵetis sin al sendefenduloj pliparte infanoj kaj virinoj. Oni pikis per bajonetoj elŝeligante "akcidente" la okulojn, oni tranĉis per sabroj, oni bategis per karabenkapoj rompante la ostojn tiel longe, ĝis la viktimoj sternis tutan preĝejplankon unu apud la alia. Kelkaj mortigitoj kaj kelkdekoj da vunditoj estis eltirataj eksteren kaj la preĝejon, superverŝitan kiel buĉejo per sango ekokupis triumfante katolika pastro. Poste sekvis multaj arestoj. — Pola gazetaro silentas — silentas la sejmo (pola parlamento). Kaj kiam aperos tie la interpelacio, ĝi estos resendata por la "raporto" al la malbonfarantoj mem al sinjoro starosto (distriktestro) aŭ la polickomisario. Silentas la liberpensulaj liberaloj — silentas pola partio social. Ne scias — silentas tuta "civilizita" homaro.

Ĉie konata estas la regulo de t. n. negra etiko: "Estas malbono, se iu ŝtelos de ni la edzinon, bono estas, se mi ŝin de iu ŝtelos". Ĉu oni ne devus tiun-ĉi etikon nomi ne la negran sed la burĝan. Pri Kroĵe oni kriegis, ĉar tie estis ektuŝita pola naciismo — pri Jastkov oni silentas, ĉar tie-ĉi estis maljustigita "nur" la proletaro. La tempoj ŝanĝiĝas, sed ne ŝanĝiĝas la poseduloj eble nur tiom, ke ili estis pasinttempe pli severaj. En "ŝlahcica" Polio la nobelo pagis por mortigo de kamparano la monpunon de unu talero — hodiaŭ povas tion fari ĉiu burĝa besto senpage.

Katilina.

3. KONFERENCO DUM PASKO 1926 DE LA REVOLUCIEMA JUNULARO EN KASSEL

Atenco kontraŭ la rajtoj de la lab. junularo

La Konstitucia Komisiono en la pola Sejmo (parlamento) akceptis leĝprojekton malpermesante al junuloj malpli ol 18 jaraĝaj partopreni politikajn kaj eĉ profesiajn kunvenojn. Per ĉi-tiu reakcia leĝprojekto la kapitalistaro celas per unu mansvingo forstreki la legalan ekzistadon de la laboristaj junul. organizaĵoj. Karakterize estas por la burĝa hotentota leĝaro, ke ĝi permesas la partoprenon sole al religiaj, filantropaj kaj kulturaj kunvenoj. Ĝuos ĉi esceptan favoron nur la burĝa junularo dum la kunvenoj de la laborista junularo eĉ kulturaj estos malpermesataj. Tion ĉi jam fidele prizorgos la policistaro. Kontraŭ ĉi-tiun leĝon protestas la tuta laborista junularo en Polio. Bedaŭrinde la laboristaj organizaĵoj junularaj ne povis ĝis nun krei unuecfronton por kune defendi siajn elementajn rajtojn de ekzistado. La penado de la Poale Cijon junularo kunvoki al konferenco ĉiujn lab. jun. org. ne sukcesis pro la krima sintenado de la oportunistaj organizaĵoj kiel PPS. kaj "Cukunft". Sed ne estas ankoraŭ malfrue. Antaŭ ol la Sejmo estos akceptinta ĉi-projekton necesas grandskale organizi protestkunvenojn. Estas klarigende al la junularo, ke ti-kiuj de la plej frua infaneco estas devigataj labori por la kapitalo kaj "rajtos" doni profitojn al la parazitaro kapablos ankaŭ digne defendi siajn fundamentajn homajn rajtojn por libereco de vortoj kaj kunvenoj. Estas tasko de la revolucia laborista gejunularo en Polio neniigi la atencon de la fiburĝaro kontraŭ la plej elementajn rajtojn de la laboranta junularo al memorganiziĝo!

Fordismo kaj Ford

A. Cenovsky

Oni konstruas ĉe la uzino aŭtomobilojn — "fordoj". Tio estas: malpezaj oportunaj, malmultekostaj maŝinoj, kiujn la amerikanoj utiligas por siaj aferoj kaj por siaj dimanĉaj familiaj vetur-promenoj. Oni faras "fordzonojn", ankaŭ malpezaj kaj nemultekostaj traktoroj, kiuj en agrikulturo, kiel mekanika forto, iom post iom forigas forton vivan, ĉevalan. Kaj nun oni komencas konstruadi aeroplanojn — taŭgajn kaj akireblajn.

La uzino estas kolosa. Sole ĝiaj konstruaĵoj ampleksas ĉirkaŭ 100 hektarojn kaj ĉiutage 700 laboristoj purigadas, ordigas kaj lavadas ilin. Sed la tuta spaco de la uzino kun kortoj, placetoj kaj loĝejoj superas 330 hektarojn.

Ĉe la uzino laboras pli ol 100000 laboristoj. Dum sia ekzistado ĝi faris kelkajn dek milionojn da "fordoj" — ridindajn, malgrandajn maŝinojn, kiuj lerte kuradas sur ĉiuj vojoj kaj facile supreniĝas deklivojn. Sed tre rapide eluziĝas kaj difektiĝas.

Lastajn jarojn la uzino dum seninterrompa laborado donas po 8 ford-aŭtomobilojn ĉiuminute. Kaj la aŭtomobiletoj seninterrompe unu post la alia elruliĝas el larĝa uzina pordego.

La laboristoj de la uzino fartas bone, ili ricevadas sufiĉe altan salajron, estas sataj, portadas ĉapelojn kaj kolorajn kravatojn, havas 8-horan labortagon, loĝas en speciale konstruitaj por loĝado dometoj. La fenestroj de la loĝejoj havas kurtenetojn, eĉ en loĝejo estas banĉambro. Kaj antaŭ la dometo estas diverskolora florĝardeneto. Sed trafi en la nombron de laboristoj de forduzino estas tre malfacile. Kvalifikitaj, spertaj laboristoj, precipe amerikanoj, ne estas akceptataj en la uzino. Estas preferataj "azianoj": sirianoj, hindoj, persoj, araboj, kurdoj ktp.

Ankaŭ estas multe da armenoj, grekoj, poloj, rumanoj, ĉekoj.

Estas multe da krimuloj, homoj kun suspektinda kriminala pasinta vivo, ĉar la uzino postulas neniujn dokumentojn kaj neniel interesiĝas pri pasinteco de akceptata laboristo.

Volonte oni akceptas malklerulojn nekonatajn kun laborista movado. Oni ŝatas edziĝintajn, sed persiste postulas, ke la edzinoj havu nenian pagatan laboron, ili sidu hejme, okupu sin pri hejm-mastrumado kaj nasku infanojn; por ke la laboristoj ne povu unuiĝi oni severe trakondukas, — kiel dum biblia konstruado de Babelturo, — la ideon de miksado de popoloj kaj lingvoj. Entute ĉe forda uzino laboras la laboristoj apartenantaj al 53 nacioj.

Akceptita ankoraŭ ne povas esti laboristo: li havas ekzamenon kaj instruadon. Oni instruas lin, kiel konfesas eĉ mem Ford, — inventisto de ĉi laborista "paradizo", — "sen superflua libra saĝeco". Li devas esti antaŭ ĉio — amerikana "ĝentilhomo" — (ĝentelmen).

Li devas havi ŝparmonon en la banko de l'uzino. Li devas raporti al la administracio pri ĉiu sia ago; kien li iras, por kia celo, kie estis kaj kion faris. Estu neniaj superfluaj sciencoj, neniaj malutilaj ideoj kaj ankaŭ ili ne sciu pri klasa strukturo de la homsocio. Kaj kiam li eltenas bonŝance tiujn ĉi esplorojn, kiam el li oni eligas ĉion vivan, spiritan, kiam oni transformigas lin je sata besto, je forda pupo, kiam lin ĉirkaŭligas per uzinbutikoj, bankoj kaj kravatoj — li estas preta . . . Li jam ne estas laboristo, li estas indiferenta al ĉio filistrulo, ethavulo.

Li fariĝas propraĵo de Ford. Oni donas al li belan "diplomon", kiun li enkadrigas, pendigas sur muron de sia hejmo kaj fiere montras ĝin al siaj infanoj. Ankaŭ laŭdas direktoron de uzino — Ford'on, kiel sia "patro kaj bonfaranto".

Sendube, Ford estas talenta homo. Laŭ naturo li estas inventisto. Kaj la tuta lia vivo povis tiel, ke li elpensadis, inventadis, sorĉadis, kun eksterordinara energio penadis, ne nur en teknika aŭ mekanika sfero, sed ankaŭ en la financa, en la sfero de monakirado. Li aranĝas, komence maltrafe, ian vaporveturilon. Li ĉiam serĉas novajn perfektigaĵojn, inventas maŝinojn de sia propra sistemo, konstruas aŭtomobilojn kaj traktorojn (mekanika plugilego) de sia konstrukcio.

Li aranĝas grandegan uzinon, en kiu ĉiuj mekanikaj detaloj estas eltrovitaj de li mem, en kiu maŝino superstaras la homon. Sciante, ke en uzina afero ofte, vere ne ĉiam laŭ sia kulpo — "unu nenion faras kaj alia helpas al li," — li organizas ĉe sia uzino tian sistemon, ĉe kiu neniu perdos nek unu minuteton dum la laboro. Laboranto staras sur unu loko, sed maŝinpartoj laŭ senfinaj rimenoj, reloj kaj arganoj venas al li.

Kaj divido de l' laboro estas organizita kaj perfekta: ĉiu parto estas farata dum 3—4 sekundoj kaj moviĝas antaŭen, por plua prilaboro. Ĝian lokon okupas dum ankaŭ 3—4 sekundoj la alia, la tria, la kvara. Kaj tiel senfine, en seninterrompa, eterna movado, kreiĝas el tiuj ĉi momentoj tuta objekto.

Kvazaŭ en ĉiu angulo de l' uzino estas sia porparta uzineto. Ideo de maŝinizado en uzina industrio estas ne tiel nova, sed Ford sistemigis ĝin ĝis la plej grandega, preciza ordo. Tio ĉi donas rajton paroli pri li, kiel pri fama, vera inventisto. Ankaŭ li estas granda financisto.

Li inventis malmultekostan produktadon, havantan grandan disvendadon kaj pro tio tute ne bezonas krediton.

Fluas la akvo, nafto kaj oleo en tuboj kaj ankaŭ seninterrompe la monoj en la uzinon. Kion nur faros Ford, kiam preskaŭ ĉiuj amerikanoj senescepte havos siajn aŭtomobilojn? Al kiu li ilin disvendos? Kaj jen Ford komencis produkti aeroplanojn.

Sed kiel ekspluatisto Ford ankaŭ estas rimarkinda kaj tre talenta. Lia tuta sistemo por transformado de laboristo je uzinparto, je senspirita maŝino kun diverskolora kravato estas diable ruza kaj lerta sistemo.

Ĝi ebligas dividi profiton je partoj, unu parto por materialoj, t. e. al Ford: alia por salajrigado de laboristoj, la tria persone al Ford mem. Kaj ĝi faris Ford'on preskaŭ la plej riĉa homo en Ameriko.

Sed se paroli pri la sistemo, ĉi tie la inventeco de Ford lin trompas nur ĝis iu tempo oni povas uzi la malklerecon, malkonscion, disigi kaj malpacigi la laboristojn de 53 naciecoj. Ankoraŭ venos la tempo, ankoraŭ venos la konscio, kiam la laboristoj komprenos tutan ĉi ruzan sistemon.

Kaj pli aŭ malpli frue, kredeble en proksima estonto tuta ĉi sistemo, la tuta ĉi fordismo de bonaj manieroj kaj diverskoloraj kravatoj flugfalos en la abismon . . .

El "Laborista semajno"
tradukis *S. Trofimov SAT 3404.*

Pafiloj kaj kirasaŭtomobiloj por senlaboruloj

En Darmstadt, ĉefurbo de Hessen (landparto sudgermana) laboristaro refoje rimarkis la liberecon de nia benita patrio. La tiea senlaborularo intencis, por plibonigi la subtenojn, okazigi demonstracion la 8. marto. Sed la ministro por internaj aferoj malpermesis ĝin. Por eviti kaj subpremi la ignoradon de la malpermeso oni mobilizis ne nur la urban policon, sed ankaŭ la "Schupo", (ŝupo regna polico), eĉ kirasaŭtomobilon.

Dum amasigo en granda strato policoficiro ordonis al siaj subuloj pretiĝi por pafado. La unua vico genuis, la dua staris, pretaj por murdi pacemajn laboristojn, kiuj nur postulas panon aŭ laboron. Certe estas, tiaj provokoj ne helpos por solvi la senlaborecan problemon, sed ili konvinkas la laboristojn, unuiĝi por venontaj batalegoj. *Sat-ano 6191*

Mortpuno por agitado

Antaŭ kelkaj tagoj Mikolaj Filas, soldato el 10. regimento, staris antaŭ militista juĝtribunalo en Lwów. Oni akuzis lin, ke dum militistaj ekzercadoj li disdonadis komunism-enhavajn presaĵojn kaj ribeligis soldatojn. Post konfirmo de kulpo la juĝtribunalo kondamnis Filas'on je mortpuno p:r pafo. Jen egala justeco por ĉiuj civitanoj. Por mortigo de du senarmaj malliberuloj policisto Muraŝko (Senn. n-o 9 [61] "Burĝa juĝistaro de Polio") estis kondamnita je du jaroj de malliberejo, dume soldato Filas nur por parolado kaj disvastigado de gazetoj — je mortpafo. *Hohol*

Amasa forigado de laboristoj

S-ro Kwapinski, deputato el PPS donas jenajn ciferojn de kamplaboristoj senlaborigitaj en tiu ĉi jaro de bienposedantoj. En varsovia vojevodio estas maldungitaj 2055 laboristfamilioj; en lublina vojev. 1895 fam.; en bialistoka vojev. 1381 fam.; en lodza vojev. 1531 fam.; en kielca vojev. 799 fam.; aŭ en 5 vojevodioj (Ĉelimteritorio, Malgrandpolio, Poznanio kaj Pomeranio) 1587 fam. Ĉiuj ĉi estis sur pavimo sen peceto da pano. *Hohol*

La 5. datreveno de kalmyka aŭtonomia regiono (USSR)

(1920—1925)

Estante preskaŭ la plej malprogresema kaj malgranda laŭ sia kvanto en tuta Sovet-Unio, popolo de kalmykoj ricevis, tamen, preskaŭ la unua sian aŭtonomion. Ĉi fakto estas tre plensignifa, karakterizante per si pornacian politikon de soveta potenco.

Komencon de sovetigado de kalmykoj vi devas kalkuli jam en jaro 1918, kiam kalmykan regionon ĝisatingis la ondoj de oktobra revolucio. Nur surpapere ekzistis tiam sovetaj institucioj en kalmyka regiono, ne sciante siajn taskojn; ne scipovante gvidi humoron de siaj rasoj. Tial ĉiuj simpatioj de granda plimulto de kalmykoj estis ĝis dua duono de 1919 por "blankuloj".

Dum unu kaj duonjaro la hordoj de Denikin plene regis sur teritorio de kalmyka stepo.

Sed jen — de dua duono de 1919 en humoro de kalmykoj fariĝas radikala krizo.

La plej efikan paŝon por tio faris "alvoko de k-do Lenin al laboranta popolo de kalmykoj", eldonita la 22. de julio de jaro 1919. Tuj post ĉi lasta eliras la 24. de julio dekreto de prezidantaro de VCIK kaj de konsilantaro de popolaj komisaroj (Sovnarkom) "pri terkutimoj de kalmyka popolo."

Estis starigita speciala komisiono por kunvoki la Unuan Kalmykan Kunveturon de Sovetoj.

En oktobro de l' sama jaro eliras 3. dekreto: "pri defendo kaj rekonstruo de kalmyka brutedukado". Bone sciante, ke brutedukado estas nura fonto por ekzistado de kalmykoj, soveta registaro decidis per ĉi speciala dekreto defendi interesojn de primitivaj mastrumadformoj. Fariĝas abrupta krizo en humoro de kalmykoj.

Ĝis komenco de 1920 tuta kalmyka stepo estis purigita de "blankulaĉaro". Komisiono por Kunvoko de Tutkalmyka Kunveturo febre por ĝi laboras. Fine la 2. julio 1920 en centro de kalmyka stepo, en malgranda kaj nekonata vilaĝeto Ĉilgir, je originala kaj solena cirkonstancaro estis malfermita la Unua Kunveturo de Sovetoj. Dum ĉi kunveturo por unue ekaŭdis kalmykoj tutan veron pri soveta potenco senpere el buŝoj de ĝiaj reprezentantoj.

Paŝtistaro per unu fojo ekkomprenis, kiel saĝa kaj ĝusta estas "politiko de alproksimigado de diversnaciaj proletarioj kaj duonproletarioj por revolucia lukto".

Ĉe generala althumoro de delegitoj estis unuvoĉe akceptita "deklaracio pri rajtoj de laboranta kalmyka popolo" la 5. julio 1920.

Ĝuste post 4 monatoj — prezidantaro de BCIK kaj Sovnarkom publikigas dekreton pri starigo de aŭtonomia regiono de kalmyka popolo.

Dum lastaj 5 jaroj kalmyka regiono elkreskis ĉiuflanke. Soci-politika aktiveco de ĝia malprogresema kaj timema loĝantaro fariĝis nemezureble pli alta, ol antaŭe; en kultura laboro ni trovas multajn atingaĵojn kaj ekstensiva mastrumado de nomadoj iom post iom aliformiĝas je intensivaj formoj.

Tiel marŝas antaŭen per fortaj paŝoj vivo de sovetiaj malplimultoj, de tiuj malprogresemaj malplimultoj, kiuj ĝis oktobra revolucio estis destinitaj por elmortado kaj kiujn sama revolucio faris plenrajtajn kaj utilajn membrojn de tiu konglomerato de popoloj, kiu nomiĝas — Unio de Sovetaj Socialistaj Respublikoj.

El "Izvestija" kompilis *P. Kirjuŝin*

Konsekvencoj

Laboristo!

Vi estas eble socialisto, ĉar vi estas justema, kaj se malegalecojn naturajn vi ne povas eviti; la sociajn, vi kredas vin devigata malaperigi. Estu sekve ankaŭ esperantisto, ĉar super la multaj, diversaj, malsamaj idiomoj oni povas starigi komunan, neŭtralan, socialan lingvon: Esperanto.

Se vi estas socialisto, ĉar vi amas la Liberecon kaj vi deziras, ke la homoj regu la naturon kaj la historion, estu ankaŭ esperantisto por venki la prabarojn lingvajn kaj liberigi nin de malfacilaĵoj, kiujn kreis dum la vivo, ĉi tia diverslingveco.

Se vi estas socialisto, ĉar vi estas raciema kaj vi scias, kiom konvenas la kolektivaj agadoj por pligrandigi la produktadon, estu do esperantisto por ligi per unu sola komuna helplingvo la okcent grupajn interkomprenilojn; tiel oni simpligas miloble la intelektan vivon internacian kaj facilegigas la ĝeneralan kulturklerigadon.

Se vi estas socialisto, ĉar vi estas artema kaj malplaĉas al vi la malbela mizero, la kruda malamo, la akraj agadoj, la malritma evoluo, fariĝu esperantisto kaj helpu al ni fondi sur neŭtrala lingva fundamento, harmonian, fratan kunvivadon.

Idealisto aŭ realisto, estu esperantisto, ĉar Esperanto estas la plej praktika solvo por intensigi facile la vivon internacian, kaj samtempe ĝi estas la sento plej pura, kiu celas reunuigi l'homaron.

Francisko Azorin.

Notoj el Britio

Pasintan jaron 434600 dekkvarjaruloj forlasas la britan lernejaron kaj eniris industrion. Por la minaco kontraŭ la salajrnormo per malkara laboro infana, la Sindikataro (TUC) komencis organizi la junulojn. Ĉu kamaradoj povas informi M. S. 25 New St. London, SW I, pri junulsekcio *en sindikato ilialanda?*

Laŭ ŝtata statistiko ĵus eldonita la registritaj laborist-sindikatoj enhavas ĉe fino de 1924, 4458147 anojn. Elspezo estis: strikpago 1151137 funt. sterl. elmigra, senlaborula kaj vetura pagoj 3175709 funt. sterl. Tuta enspezo estis 8236190 funt. sterl. kaj monprovizo 11434414 funt. sterl. Ĝenerale montriĝas pligrandiĝo.

Pro neoficiala striko en Londono (ĉe la firma Hoe) la kapitalistoj de la maŝinfabrikejo decidis "lokaŭti" en Tutbritlando sian dungitaron. Prokrastiĝis la lokaŭto dum unu semajno sed tre gravas por la brita sindikataro. Tiel efektiviĝas la sonĝo Baldwina al paco industria.

La Ekzekutivo de la Sindikataro Laborista nun entreprenas la organizadon de la virinoj. Specialaj rekrutaj kunvenoj okazas. Estis proponate ĉiujara kongreso por sindikataninoj kaj medalo estos donota al la virino, kiu pleje helpis la organizadon dum pasinta jaro.

Dum multaj jaroj la brita financisto bojkotis Sovetlandon, ĉar ĝi rifuzis pagi la ŝuldojn de la Caro. Pro manko de kredito multaj firmaoj kiuj volas, ne povas sendi maŝinojn al la rusa registaro. Same agis la usona bankisto. Eĉ kiam la sovetaj diplomatoj konsentas kompensi la ŝuldposedantaron la afero ne ŝanĝiĝas. Kontraŭe la hejmo de faŝismo — Italio, povas pruntepreni facile en Nov-Jorko kiom ĝi volas kaj devas pagi ĉiujare nur 4,5 mln. da funt. sterl. sur ŝuldo de 600 mln. da funt. sterl. Ŝajne iu lando, kiu volas havi kapitalistan helpon devas buĉi socialistojn, bruli kooperativojn kaj kruele persekuti laboristojn. *488*

Persekutado en Jugoslavio

Ni jam evidentigis fakton pri k-do Ĉaklec, labor. esperantisto, sed ricevinte persone de li pli detalajn informojn ni antaŭ tuta mondo devas elmontri per kiuj aĉaj rimedoj jugoslava polico deziras sufoki tiun ideon, kredante sukcesi pere de ĝiaj persekutadoj devigi laboristojn forgesi sian devon. Antaŭ tri monatoj supre-nomita k-do ricevis el Sov.-Rusio de unu lia korespondanto ruĝ-armeano unu poŝtkarton kun bildo de Trocki, kaj tiu poŝtkarto estis ĉe poŝtejo de polica detektivo retenita! Tuj policestro vokis s-on Rupĉiĉ, prezidanto de Esp.-klubo por ke li traduku tion, kaj samtempe policistoj serĉadis adresaton. Krom tio policestro ordonis al presidanto tuj alporti nomaron de klubo. K-do Ĉaklec troviĝis tiutempe en Osijek, kie ili lin enkarcerigis, kaj enkatenigiton akompanis du ĝendarmoj en Belgradon, el Belgrado en Zaprebon, kaj finfine en Spliton -- kaj dume pasis 39 tagoj de lia grandega suferado kaj malsatado. Apenaŭ veninte Spliton, li estis ekzamenita, kaj simple, sen pardono, forlasita sub kondiĉo, ke li devas sin anonci al polico en ĉiuj lokoj kien li vojaĝos. Do, vi vidas k-doj kiel facile estas en Jugoslavio esti enkarcerigita kaj dum monatoj retenita en mallumo, sed ne kredu, ke spirito nia kiel niaj korpaĉoj staras je dispono de polico!

Jugoslavio superregas Italion faŝistan! Antaŭ ol krimulo Musolini malpermesis Esp-on al laboristoj, nia registaro polica malpermesis jam antaŭ unu jaro en kelkaj vigliĝantaj vilaĝoj Esp-on, kaj en kasteloj de Split ĝi estas polic-ordone malpermesita du monatoj antaŭe. Tiuj du ŝtatoj vetbatalas por esti pli reakciaj. *Persiste*

LABORISTA RADIO-INTERNACIO
Suplementa paĝo de Sennaciulo — Aperas dufoje monate

Negro-linĉo disaŭdigata per Radio

"Atentu, atentu, ĉi tie estas Ocala en Florida, ondo XXX! Tre estimataj gesinjoroj! La gvidantaro de nia sendstacio sukcesis prepari al vi tute apartan ĝuon. La negro Nik Williams, kiu komerciston malĝentile alparolis estis hodiaŭ ekkonata de la publiko kaj kaptita. La komercisto reekkonis en li sian kriman ofendinton. Oni kaptis la negron, irantan al la laborejo kaj el la hoteloj kaj vilaoj fluis la homoj por partopreni la linĉon. Al ni prosperis igi la publikon fari la linĉon antaŭ la mikrofono por ke vi ĉiuj povu partopreni.

Atentu, komenciĝas! Ĉu vi aŭdas la bestecan kriegadon de la krimulo kaj la bruon de la venĝanta amaso? Neniam prezentiĝis al la Radio-aŭskultantaro de Florida tiaj aĵoj. — Ĉu vi aŭdas la kriojn? Nun ili ekbatas. Li jam kuŝas surtere. — Ĉio estas kovrata per lia malpura sango! Ha, la bato ĝuste trafis! La okuloj jam elŝveliĝas. Ĉu vi aŭdas lian miaŭon? Krii li ne plu povas . . . Ĉu vi aŭdas la pafon? Nun li jam mortis. Domaĝe, ke la nigra besto tiel rapide finis! Nun, ekzistas ja sufiĉe da aliaj en Florida.

Tre estimataj gesinjoroj! Nia aranĝo perjene finiĝis. Ni esperas, ke vi povante bone aŭskulti plene ĝuis nian prezentadon . . ."

Oni ne kredu tion — fantaziaj ideoj de iu forkurinta frenezulo. Eble, ke la tradukaj vortoj de l' publikiginto ne estas tute precizaj — kion li diris, okazis plendetale la 20. januaron 1926 en Ocala en ŝtato Florida de U. S. A. antaŭ la tiea Radio-sendilo. La negro-laboristo Nik Williams estis trenita de burĝa homaĉaro pro "malĝentileco" kontraŭ blankulo antaŭ mikrofonon, kie oni linĉis lin. Tio estis novaĵo eĉ por la amerika Radio.

Tiel la gazetraporto.

Se tio okazintaĵo ne jam estas ĉiutaga, tamen ĝi montras al ni eron de l' burĝa "kulturo": la arte breditan rasmalamon. Cetere ĉi tiu okazintaĵo plene konformas kun la filmoj montrantaj mondmilitajn scenojn, kiuj dum kaj post milito stultigis la proletaron kaj amuzigis la "venkantojn" malantaŭ la hotelaj tabloj.

Kiel la burĝaro fiagas per Esperanto, tiel same ĝi agus per Radio kaj el tio rezultas . . .?

Komp. Sao 3414.

Iom pri Radio en Latvio

En nia lando la Radio-febro rapide disvastiĝas. Por starigi memkonstruitan detektorricevilon, aŭ lampricevilon, plombitan de p. t. administracio, oni bezonas nur antaŭpagi la kvaronjaran abonon je 6 latoj (= 6 sv. fr.). Tiu-ĉi estas kategorio de R.-abonantoj. Po ĉiu memkonstruita detektorricevilo ili pagas 2 latojn da stampimposto. Unulampa ricevilo, konstruita en ŝtata metiejo, kostas 140 latojn kun ĉiuj akcesoraĵoj kaj instalado. Ŝtataj salajruloj rajtas partopagi dum oficiala budĝetjaro.

Konstrui lampricevilojn kaj eksperimenti rajtas nur la kategorio de R.-eksperimentantoj. Ĉi-tiu kategorio pagas la saman abonpagon po 6 lat. kvaronjare sed por ĝi ekzistas ekzameno, konsistanta el elementaj pri-radiaj teknikaj reguloj. Eksperimentistan permeson sen ekzameno ricevas privatuloj kun teknika klerigado kaj teknikistoj de telegrafa servo.


Permesu esprimi deziron, kiun certe sentas multaj R.-amatoroj, atingu ĉi orelojn de sendstacioj! Por ni, amatoroj, ofte ŝanĝantaj la ricevilskemojn, gravas konstati ĉiujn aŭdatajn sendstaciojn, do ili antaŭ ĉiu komencota programnumero klare menciu la nomon de stacio. Tiurilate multe pekas la germanaj stacioj, kelkaj el ili tute ne prezentas sin, aŭ faras tion per parolmaniero tute ne komprenebla al negermanlingvanoj, kvazaŭ forglutante la vortojn. Modele sin anoncas sendstacio Brno, Ĉekoslovakio, — trilingve, kelkfoje ripetante.

Akcepton de Esperanto, kiu pro siaj difinitaj vortfiniĝoj estas tre klare aŭdebla, almenaŭ por anoncado de stacinomoj, salutas ĉiuj R.-amatoroj, ankaŭ ne-esperantistoj.

Amatoro

Altvalora superŝalto

(Negadyme ŝalto)



En SAT certe estas multaj progresintaj Radio-amatoroj. Al ili mi konigas ĉi tiun ŝalton, de mi elprovitan. Mi uzas ĉambran antenon. Tero estas ĉe anodo plus; 1 = variebla kondensatoro 1000 cm (500), 2 = variebla kondens. 500 cm (300), 3 = ŝanĝebla bobeno, 4 = fiksa kondensatoro 250—300 cm, 5 = rezisto 2 Megohm . . . (M Ω) 6 = fiksa kondens. 1000–2000 cm, kiu eventuale estu enmetata. R 1 = hejtrezisto kun precizkontakto . . . R I servas kiel rekuplo (retrokuplilo). La unua lampo (valvo) havas du kradojn. La dua krado estas almetata ĉe la svingcirklo . . . kaj devas havi pozitivan anodofluon. La dua lampo plifortigas kaj povas havi apartan anodotension ĝis 60 volt. laŭ la speco de la lampo. La transformatoro povas esti 1 : 5 ĝis 1 : 7. Mi petas la k-dojn, kiuj konstruos ĉi-ŝalton, sciigi al mi siajn rezultatojn. Per altanteno mallonga (30 ĝis 40 m) oni atingos plej bonajn sukcesojn. Volonte mi estas preta doni detalajn klarigojn letere, se oni aldonas afrankon.

H. Remers, Düsseldorf (656)

Radio en Ĉekoslovakio

Laŭ la statistika raporto funkciis ĝis fino de februaro pli ol 40000 radioaparatoj. El tiu sumo oni dekalkulas laŭ urboj apartaj: Praha kaj provincoj 30279, Brno (Brünn) 5888, Pardubise 1813, Opava 1228, Bratislava 2000 kaj Košice 443 akceptilojn. En lasta tempo estis multaj petskriboj ĉe la poŝtoficejo de Praha por permeso de Radio-stacio. Kaj oni kalkulas ĝis nun proksimuman plialtigon je 20000 stacioj. Apenaŭ en Pilsen Radio komencas vivi, ĉie en tuta Ĉekoslovakio ĝi estas uzata nur de riĉuloj pro la multekosteco. Laboristo devus ŝpari duonan jaron sian tutan salajron, se li volus aĉeti Radioakceptilon. Do ni povas aŭskulti nur burĝajn paroladojn kaj koncertojn.

Pilsen 409

Minsk (Sovet-Blankrusio)

Minska Radio-stacio en la nomo Sovnarkom de BSSR (Soveto de popolkomisaroj de BSSR) komencis en februaro Esperanto-kurson por tuta Blankrusia SSR. Lekcioj okazas ĉiulunde je la 8 vespere. Polaj kamaradoj — ĉu vi aŭskultas niajn paroladojn?!

La Laborista Radio-klubo de Germanio

akceptis dum sia II. Regnokonferenco (6.—7. marto en Berlin) unuanime jenan decidon:

"La Regnokonferenco rekomendas al ĉiuj ARK-lokoj" por siaj eksterlandaj interrilatoj kiel eble plej apliki Esperanton kaj kun ĉiuj fortoj subteni ties disvastiĝon.

Proleta Radio-stacio en Okcidenta Eŭropo

ODR (Societo de Radio-amikoj) ricevis informon de "Libera Radio-Unuiĝo" el Vieno pri la komenco de laboro de Radiostacio, apartenanta al ĉi-unuiĝo.

Radio-unuiĝo estas proleta organizaĵo de German-Aŭstrio. Apartenanta al ĉi-unuiĝo la stacio estas sola proleta stacio en tuta Okcident-Eŭropo. Ĝi laboras dimanĉe de 9 ĝis 10 horo matene laŭ mez-eŭropa tempo en ŝanĝanta ondo 100—400 metroj. Elvoka signalo: "Allo, allo ĉi-tie parolas amatora transdonanta stacio de German-Aŭstrio!" Transdonadojn oni faras en lingvoj: germana, rusa, angla, franca kaj Esperanto. Programo de transdonadoj: paroladoj kaj muziko.

La unuiĝo petas ĉiujn Radio-amatorojn, aŭskultintajn ĉi-stacion —, komuniki pri aŭdebleco laŭ la adreso: Wien X, Arsenal, Al la Libera Radio-unuiĝo.

El "Novaĵoj pri Radio" elrusigis *N. Ĥolm*

Pri "Socia Venonteco"

Unue mi devas peti la k-dojn, kiuj skribis al mi pri S. V., ke ili bonvolu senkulpigi min pro mia silento. Mi ja respondis individue al ili petante, ke ili iomete paciencigu, ĉar tiutempe mi estis tradukanta la statutojn de la orfejo kaj diversajn dokumentojn. Ĉar, kiel edukisto en tiu proletara orfejo mi ne havas grandan libertempon. Mi ĵus finis tradukadon de la statutoj, sed . . . Verŝajne post kelkaj semajnoj ili estos ŝanĝitaj pro tio, ke la orfejo estos kunligita al I. L. H. Pro tio ne plu estas necese, ke mi konigu nunajn statutojn.

Sed la fakto, ke S. V. kunligas kun I. L. H. ne malebligas, ke SAT-anoj interesiĝu je S. V.; ĉar 1. SAT estas organizaĵo-membro de I. L. H.; 2. ni daŭrigas la celon fari el S. V. veran sennaciecan orfejon, t. e. akcepti ĉi-tie ĉiulandajn georfojn kaj disdoni al ili sennaciecan proletaran edukadon.

Por tio ni nepre bezonas kunlaboradon de ĉiulandaj k-doj.

Por ke ni sukcesu starigi en S. V. veran sennaciecan edukadon, doni al la georfoj veran sennaciecan spiriton, estas necese:

1. ke ni ricevu ĉi-tie georfojn el kiel eble plej multaj landoj, se eble eĉ el diversaj rasoj;

2. ke la infanoj mem povu vivadi dum kelkaj monatoj en diversaj landoj. Tio certe estas ebla! Sed ebla nur se multaj k-doj helpas nin.

Kondiĉoj ŝanĝiĝis por la orfejo; sed tio estis paŝo antaŭen por nia celo; novajn rimedojn ni do devas uzi por starigi ĉe proletorfoj sennaciecan edukadon.

I. L. H. estas ja internacia — ne sennacieca — organizaĵo; tamen, el la gravaj internaciaj organizaĵoj ĝi estas la plej proksima al sennacieco. Sed ĝi ankoraŭ baziĝas sur naciaj sekcioj preskaŭ memstaraj, t. e. havante iliajn proprajn rimedojn kaj buĝetojn, la centra kaso helpas nur kiam estas necese. La naciaj oficoj decidas eĉ pri gravaj aferoj. Ekzemple, kiam temis pri kunligo de S. V. kun I. L. H. nacia ofico de I. L. H. decidis kvankam temis por I. L. H. pri elspezo je proksimume 200 000 fr. jare. Kiam nacia ofico decidas pri gravaj aferoj povas nur ekzisti internaciismo, ne sennaciismo.

Ni do povas kaj devas labori al sennaciigo de I. L. H.

Kion do ni povas praktike fari? Ĉu I. L. H. posedas ankaŭ orfejon en aliaj landoj? — tion mi ne scias (ti-kiu scias bonvolu informi min ne konfuzigante inter "Internacia Laborista Helpo", kaj "Internacia Ruĝa Helpo", kiu estas du tute malsamaj organizaĵoj).

Do en landoj kie I. L. H. posedas orfejojn, SAT kaj la k-doj, kiuj estas membroj de I. L. H. agu kiel eble plej energie, por ke tiuj orfejoj sendu junajn georfojn al S. V. kaj petu georfojn el S. V. En landoj kie I. L. H. ne posedas orfejojn SAT kaj la k-doj I. L. H.-anoj agu por ke nacia sekcio de I. L. H. sendu al S. V. junajn georfojn; se estas necese la k-doj mem proponu georfojn ĉe sia nacia sekcio de I. L. H. petante ĝin, ke ĝi ilin sendu al S. V.

Jen unua agado, kiu estas ebla. Jen dua:

Se I. L. H. posedas aliajn orfejojn la k-doj agu tiamaniere, ke en ĉiuj tiuj orfejoj oni instruu Esperanton cele al rekta interkorespondado de la edukistoj kaj de la infanoj, interŝanĝigante ilian sperton pri edukaj metodoj kaj infan-organizado. Tiucele la k-doj povas sin apogi sur tiu fakto, ke en S. V. ni instruas Esperanton kaj interkorespondas kun proletinfanoj el Sovetio, kaj korespondos kun aliaj landoj ankaŭ. Scio de Esperanto flanke de la infanoj en la diversaj orfejoj de I. L. H. tre helpus nin por interŝanĝo de infanoj.


Jen tria laboro ebla:

En landoj kie ekzistas sufiĉe forta I. L. H.-sekcio kaj ne ankoraŭ I. L. H.-orfejo, la k-doj agu por ke nacia I. L. H.-sekcio organizu orfejon, kiu instruos Esperanton kaj disdonos sennaciecan edukadon.

Jen kvara tasko:

Estas tasko de SAT ne nur propagandi Esperanton pere de peresperantaj servoj, sed ankaŭ, kaj eble eĉ precipe **propagandi Sennaciismon!** Cetere, kiam ni propagandas sennaciismon, ni preparas grundon por sennacieca lingvo.

Certe estas peza tasko sennaciigi tutan I. L. H.; almenaŭ ni povas esperi, ke ni atingos sukceson, se ni laboros por sennaciigi unue fakon de I. L. H.



Eduk-domo de Socia Venonteco (ĉefa fasado)

Simpla afero

Rakonto de Eduard Vida

iama ruĝarmeano de la hungara sovet-diktatoro

IRH . . . La 26. marto 1919, kvin tagojn post la proklamo de la hungara sovet-respubliko, franca okupa trupo, konsistanta el kvin oficiroj kaj 185 soldatoj, marŝis de Szegedin al Arad (do ĝi moviĝis sur teritorio de la hungara sovet-respubliko, kontraŭ kiu la franca imperialismo asertis troviĝi en militstato). La franca trupo a'celis la urbeton *Mako*, kaj de la tiea ruĝa posteno, sub la gvidado de la komandanto Stephan Szieber, ĝi estis senarmita. La francojn arestitajn en malamika lando oni eskortis kiel milit-kaptitojn al Budapeŝto. Irante tien kaj en la urbo mem oni plej afable traktis ilin. Kaj post diplomata traktado inter la sovet-registaro kaj la franca militgvidantaro ili post kelktaga mallibero reliberiĝis. Okaze de la arestado oni forprenis de la francoj ses kanonojn kaj sep kun nutraĵoj plenigitajn ŝarĝaŭtomobilojn. Kompreneble la franca militistaro rericevis siajn kanonojn kaj ŝarĝaŭtomobilojn, kaj por la nutraĵoj, kiuj estis disdonitaj al la malsata loĝantaro pro la dum tiu tempo en Hungario reganta nutraĵmanko, estis pagitaj kiel rekompenco kvin milionoj da kronoj.

Komence de aprilo mi estis sendita kiel politika komisaro al la divizikomando en Bekeŝ-Ĉaba por gvidi la esploron. Mi ricevis la komision (por eviti plurajn diplomatajn diferencojn) esplori, ke la ruĝa posteno memstare senarmigis la francojn, kaj la komandanto estis severe kritikita. Per tio la afero estis ordigita. La franca okupanta komando en Sudhungario estis kontenta kun la donita "kontentigo".

Kiam mi poste, la 11. julio, komisiite de la registaro en sekreta misio iris al Szegred — tiu urbo estis okupita dum tiu tempo de la francoj, kaj ĉi tie formiĝis la unuaj grupoj de la kontraŭrevolucia armeo — la poste publikigita kontraŭrevolucia oficiro Bibo, kiu ekkonis min, kun la oficirpatrolo, staranta sub lia gvidado, tuj post mia alveno arestis min. Ili transigis min al la franca polic-komandanto leŭtenanto Aquaviva kun la denunco, ke mi la 26. marto ordonis la senarmigon de la franca trupo en Mako kaj persone estis gvidinta la senarmigon. Krom tio mi estus provokinta la hungarajn soldatojn, mortbuĉadi la francojn, kio ankaŭ okazis (post la malapero de la francaj soldatoj nome disvastiĝis la famo, ili estus mortigitaj). Sed tio ne jam sufiĉis. Mi kun la pafilo en la mano ankaŭ estus deviginta eksoficirojn de la monarkio eniri la ruĝan armeon.

Sub tiuj pezaj kulpigoj oni transliveris min al la franca militjuĝejo en Sofia. La 22. oktobro okazis antaŭ la militjuĝejo de la 72. divizio la proceso. Mian defendon transprenis la ministro Kolarov kaj la parlamentanoj Nedelkov kaj Atanasov, ĉiuj tri advokatoj en Sofia. Mi defendis min kun la fakto, ke mi dum la kritika tago, la 26. marto, pruveble

La k-doj agu tiamaniere ke I. L. H. starigu specialan *internacian* kason por la infandomoj siaj; ke tiu kaso estu 1., provizumota de ĉiuj naciaj sekcioj kaj 2., provizumonta ĉiujn de I. L. H. infandomojn tute indiferente en kia lando troviĝas tiuj infandomoj kaj kiom da mono ricevis tiucele la nacia sekcio de tiu lando. Nur tiamaniere ni sukcesos starigi sennaciecan edukadon en la proletinfandomoj, kaj disvolvigi ĉe la tutmonda proletaro sennaciecan solidarecon, kiu kreas sennaciecan senton.

Do, ĉiu SAT-ano laboru de nun ĉe tiuj taskoj! Plue! Li interesigu pri tiuj taskoj ankaŭ k-dojn ne-SAT-anojn, eĉ ne-esperantistojn, tiele li faros utilan SAT-anecan, SAT-anigecan laboron, kaj profitos la proletaro tutmonda.

Al Radio Amatoroj!

Al vi, k-doj Radio-Amatoroj, ni sendas specialan alvokon.

Bedaŭrinde en Francio laborista klaso ankoraŭ ne komprenis, kian gravan rolon radio ludas por proletedukado; la laboristoj ne kreis Radio-Klubojn, ĉar ili rigardas Radion kvazaŭ kiel amuzilon, por riĉuloj; do dependas de vi, k-doj el Germanio kaj Rusio, ke ni devas peti por la proletorfoj en S. V. radio-ricevilon, per kiu la infanoj povus aŭdi esperantajn paroladojn el aliaj landoj. Pripensu, kiom grava estus la fakto, ĉar per ĝi ni povus de nun montri al la infanoj kaj al laboristoj 1. ke solidareco devas esti sennacieca; 2. kiom granda estas la rolo de Esperanto por laboristaro; 3. Kiom grava estas Radio por laborista klaso; plie ni povus pli bone disvolvigi ĉe la infanoj kaj ankaŭ ĉe la plenaĝuloj eksternacian sent- pens- kaj agadkapablon, t. e. plenumi SAT-celon.

Do, k-doj SAT-anoj en ĉiuj landoj de nun agu! Senprokraste helpu al ni en nia grava laboro! Tion farante vi helpos al sennanciiĝo de laborista klaso, tio estas al celo-mem de SAT.

Por edukistaro en Socia Venonteco
Robert Soudant (*140*).

Pariza Esperantista Laborista Grupo jam aniĝis Socian Venontecon; kiu sekvos? Tiu skribu al "*Avenir Social*" (Socia Venonteco) en *La Vilette aux Aulnes par Mitry-Mory —S. et M. — Francio.*

≡ KRONIKO ≡

Germanio

Elberfeld kaj Barmen. Dum la monato novembro kaj decembro pasintan jaron estis aranĝata mallonga sed intensa propagando inter la lab. sportuloj. La 7. dec. k-do Artur Wieditz faris paroladon pri la temo "Esperanto kaj sportularo" en kunsido de Sportkartelo Elberfeld. Ĉi parolado kaŭzis viglan diskutadon inter la delegitoj. La sukceso estis, ke ĉiuj delegitoj deklaris, vigle varbadi inter siaj membroj por kurso. Kaj ili plenumis kontentige sian promeson. La 11. jan. komencis en Elberfeld du kursoj kun 90 partoprenantoj, inter ili ĉ. 20 k-dinoj. Ĉi-loke ankoraŭ ne ekzistas Lab. Esp. Grupo. Sed nun intense estas preparataj la fondigo de LEA-grupo kaj SAT-rondo.

En la najbarurbo Barmen, kie jam ekzistas malgranda LEA-grupo, dume varbadis kelkaj k-doj, gviditaj de k-do Paul Reuters ĉefe en la turistunuiĝo "La Naturamikoj". Sed la sukceso ne estis tiel bonega kiel en Elberfeld. Anoncis sin al kurso, kiu ankaŭ komencis la 11. jan., 35 partoprenantoj. Do, entute partoprenas en Elberfeld kaj Barmen 125 gelernantoj. Instruanto en ĉiuj kursoj estas k-do Artur Wieditz, Elberfeld. Estas instruate laŭ la gramatika metodo. La gelernantoj kunvenas en Elberfeld ĉiulunde kaj ĉiumerkrede je la 8 h. vespere en la senkonfesia popollernejo Franzenstr. En Barmen ĉiujaŭde je la 8 h. vespere en la junulhejmo Brucherschulstr. Gekamaradoj el la najbarlokoj estas petataj laŭpove partopreni kaj kunhelpi antaŭenpuŝi la lab. esp. movadon en ĉi lokoj. Vi estas ĉiam kore bonvenataj al ni. *SAT-ano 821*

Polio

Lwów. La 31. jan. okazis ĉiujara generala kunveno de Laborista Esperanto-Societo. Post raporto de k-do Dvorak, kiu pro profesiaj okupoj devis bedaŭrinde rezigni de sekretarieco; estis elektitaj k-doj: J. Kucharz (prezid.), St. Zaŭsmer (vicprezid.), B. Maiblum (sekret.), St. Rajca (kas.). Krom elekto de nova estraro, oni decidis liberigi de kotizpagoj entute senlaborulojn kaj studentojn.

Antaŭ nelonge finiĝis kurso kun 60 lernantoj. Nune ni aranĝas grandskalan propagandon en prof.-unioj por Esperanto kaj varbi partoprenantojn por la nova kurso, kiu komenciĝos la 15. marto sub gvido de k-do Maiblum. Supera kurso estas projektata. Dum la kursoj ni uzas, post kelkaj komencantaj lecionoj, la lernolibron "Petro", kiu alportis jam bonajn rezultojn.

Nia Societo vigle laboras kaj esperantigis multe da laboristoj. *Beno (5236)*

Sovet-Unio

Gomel. La movado ekzistas jam de unu jaro. Nun, tra la tuta distrikto (gubernio) en movado partoprenas pli ol 700 personoj, el ili en Gomel — 350. Pasintjare estis unua gubernia konferenco, en ĉi-jaro, *en komenco de la aprilo* ni kunvokas la 2. konferencon Ĉi tiu konferenco devas ludi gravan rolon kiel plia vasta interligo nia kun sociaj organizaĵoj, ĉar ilin ni havos oficiale reprezentataj.

Por ke la movado des pli gajnu — ni opinias aranĝi Esperanto-ekspozicion, kie fako de internacia laborista interligo estos (pli vere – devos esti) – granda kaj interesa. Sed ni havas tre malmulte de leteroj, naciajn Espo-gazetojn, esperantajojn. Do je nomo de gesamideanaro distrikta ni petas la kamaradojn en ĉiuj landoj helpi al ni aranĝi la ekspozicion kaj sendi por ĝi: 1. leterojn — kun plej praktika kaj interesa enhavo eventuale ni ilin uzos por nia gazetaro. 2. Poŝtkartojn ilustritajn kun vidaĵoj de diverslandaj urboj. 3. Viaj propagandiloj, propagandmarkoj, ktp. 4. Naciajn Espo-gazetojn (ilin ni tute ne havas). 5. Fotografaĵojn. 6. Naciajn gazetojn, uzantaj esperanto. 7. Salutleterojn al laboristoj de nia gubernia okaze de la konferenco, kaj al konferenco mem.

Akcelu la movadon!

Adreso: Sovetio; Gomel, poŝtkesto 40, Gubkom SEU. *Gomela Gubkomo de SEU*

Ivanovo-Vozmesensk. Gub. Fako de SEU (urbo de ruĝaj geteksisistoj) agas imitinde:

Esp.-gelernantoj el lasta grupo de 2. ŝt. lernejo post monata elementa esp. kurso transdonas la sciojn al gek-doj en la du lastaj grupoj de unua-ŝtupa lernejo. Do en kvin lernejoj estas enkondukata (dume fakultative) internacia lingvo, kaj geinstruantoj havantaj por si praktikadon estas honorigataj de GFSEU per SAT-anigo kaj SEU-anigo kaj la plej fervoraj per espgazet-ĵurnallaboro.

---

estis en Budapeŝto, kaj nur la 1. aprilo estis sendita al Bekeŝ-Ĉaba (do ankaŭ poste ne al Mako). La urba komandanto de Arad, generalo Gondrecourt, konfirmis en oficiala komuniko, ke li la 190 senarmitajn francojn, ĉiujn kun sendifekta haŭto, rericevis. Neniu el la francaj oficiroj senarmitaj en Mako povis ekkoni min kiel gvidanton de la senarmiga ago, kiam oni kontraŭfrontis ilin al mi. Tamen oni en ĉiuj akuzantaj punktoj deklaris min kulpa, kaj mi estis kondamnita al dumviva deviga laboro. Szieber, kiu ankaŭ venis en la manojn de la francoj, estis kondamnita al morto.

Laŭ ordono de la armea superkomandanto Franhet d' Esoérey revizia proceso okazis la 27. marto 1920 antaŭ la Conseil de Guerre de la macedona armeo en Saloniki. La estro, supera leŭtenanto, deklaris tute senkaŝe, li estus konvinkita de la netenebleco de tiu kontraŭ mi kulpiganța akuzo. Sed li estus ligita al la konstatita kulpigo en Sofia. Pro tio mi ricevis la plej maltan punon, kvinjaran fortikaĵkarceron. La estro hontigis en sia pruvigo de la juĝo la agon de la szegedaj hungaraj oficiroj, kiuj denuncis iliajn samlandanojn pro politika fimalamo ĉe armeo, kiu okupas parton de ilia lando. Sed kion utilas al mi tiu eldiraĵo? Komune kun Szieber mi estis ligita en feraj ĉenoj, kaj tiel kunligitaj oni tiris nin de urbo al urbo, de bivako al bivako, kun nigraj krimuloj, kun mortigistoj kaj rabistoj, lokitaj en ĉevalejoj kaj en mucidaj keltruoj, kaj kuntiritaj pli lo jaron kun disŝiritaj ĉemizoj, nutritaj per restaĵoj, dismorditaj de fiinsektoj, kuntiritaj kun ĉifonitaj vestaĵoj trans Konstantinoplo, trans Sirio, Beirut kaj Marseille.

De Marseille oni poste forvenigis Szieber, kiu estis amnestita al dumviva malpermeso de la landeniro. Mi venis al Clairvaux, kie mi renkontis amason da politikaj "krimuloj", la nunan deputaton Marty kaj la ceterajn ribelantajn ŝiparsoldatojn de la nigra maro, la abesinan konsulon de Germanio kun sia sekretario kaj tri oficiroj kaj aliaj.

Ĉi tie, mi povus diri, mi ankoraŭ pli malbone estis traktita ol en la malpuraj bivakoj sur la Balkano kaj en Antaŭ-Hindio. La respondo al mia postulo pro traktado kiel "politikisto" estis; individua (unupersona) karcero. Mi troviĝis dum sep monatoj en ĉelo ne hejtita kaj kun ŝtonfundo, nur vestita per ĉemizo, manoj kaj piedoj katenitaj, de brutaj karcervartantoj ofte sangbatita. La karcera kuracisto D-ro Marion foje almetis ĉe mi bandaĉon, kiam estis rompita ripo, sed li tuj ree enkatenigis min.

Mi ne estis, tion mi devas konfesi, paca gasto de la karcero — la konscio, senkulpe esti ĵetita en la karceron, ne donis al mi trankvilon. Oni venigis min al Caen, kie mi strikis dum dekdu tagoj rifuzante la manĝaĵojn. Ĝi nenion utilis, mi restis tie dektri monatojn, kaj nur en junio, post finiĝo de mia kvinjara karcero, mi estis liberigita.

Nun mi ree estas libera . . .

Elgermanigis 715.

Komence estis propono de Gub. Fako SEU al klerigadministrejo enkonduki la lingvon. Poste sekvis respondo de Gub. ONO (Regiona Kleriga Fako), ke oni povas instrui esp. kondiĉe, ke geinstruistaro estas salajrata de lokaj esperantistoj . . . Kaj jen solvo de la afero! Gek-doj, imitu enkonduku la lingvon en la lernejojn.

SAT-ano 3409

Kievo. La 25. februaro k-do Egers (4544) faris raporton pri Esp-o ĉe 48. lernejo. Kiel subraportantoj parolis du knaboj: prezidanto de Esp.-grupo ĉe 80. lernejo kaj juna pioniro el la sama grupo; la unua — pri laboro de sia grupo, la dua — pri signifo de Esperanto por junpionir-movado. Rezulte la ĉeestintoj elektis organiztrion por fondo de grupo. *728*

Leningrad. Laŭ SAT-jarlibro 1925 ni havis en Leningrad 51 membrojn de SAT. El tiuj 51 ni sukcesis reanigi por nuna jaro 40 gek-dojn, kaj varbis krom tio ĝis I/III ankoraŭ 73, tiel ke la nova jarlibro enhavos la adresojn de 113 membroj. Dank al tio, ke ni iris en masojn, en laboristajn klubojn, ni nun havas kelkajn dekojn da esperantistoj-laboristoj, dume en antaŭa jaro la leningrada SAT-anaro konsistis preskaŭ nur el inteligentuloj. Plej bonajn rezultatojn rilate aniĝon al SAT donis niaj centraj (pagaj) kursoj, kie ĉiuj kursanoj senescepte (26 gek-doj) dum pasinta semajno aniĝis al SAT. Bravo!

Fondita pro troa ŝarĝiteco de "Nova Epoko" en Moskvo — esperanta agentejo en Leningrad multe vigligis ne nur esp.-movadon en Leningrad, sed en tuta Sovetio. Ĝi agentejo inter alie vendis 1354 lernolibrojn, 1161 vortarojn, apartajn numerojn de diversaj ĵurnaloj esp. 619. De la kursa lernolibro "Petro" ni disvastigis 454 ekzemplerojn, plejmulte en Leningrad. Diversan alian literaturon ni vendis 464 ekzemplerojn. Tiuj ciferoj estas prenitaj el raporto pri laboro de nia agentejo de 15. 6. 1925 ĝis 1. 3. 1926. Dum tiu sama tempo nia agentejo plenumis: 272 kvaronjarajn abonojn al "Sennaciulo", 45 jarabonojn al "Senn. Revuo", 214 SAT-kotizojn, kaj multajn abonojn al diversaj aliaj ĵurnaloj, kiel Liberpensulo, Novaj Tempoj, Fervojisto, Internacia Medicina Revuo, kaj aliaj. Krom tio nia agentejo starigis adresaron de sovetiaj esperantistoj kuracistoj kun 80 adresoj.

Plej elokvente parolas la ciferoj de spezo, montrantaj la konstantan kreskon de nia movado:

I/1925	— 44 rub.	VIII/1925	— 165 rub.
II	— 70 rub.	IX	— 431 rub.
III	— 80 rub.	X	— 499 rub.
IV	— 97 rub.	XII	— 598 rub.
VI	— 113 rub.	I/1926	— 828 rub.
VII	— 120 rub.		

H. Frank (2144)

Imitinda ekzemplo. — Jen kia devas esti kronika raporto kaj la laboro en la SAT-anaro! *Red.*

Minsk (Sovet-Blankrusio). 14. aprilo en Minsk okazos minska distrikta konferenco de SEU.

Oficejo de Internacia Laborista Interligo tre vigle laboras inter gazetaro. En "Profesia Movado", "Blankrusia vilaĝo", "Ruĝa apudlimano", "Krasnoarmejskaja Pravda" "Ruĝarmeana Vero" kaj aliaj. Oni akurate presas artikolojn peresperantajn.

Dum lastaj du monatoj en "Ruĝarmeana vero" estis presitaj ĝis 70 tiaj artikoloj.

"Profesia movado" kaj "Blankrusia vilaĝo" presas fotografaĵojn, ricevitajn per Esperanto.

Ekz. en n-o 3 de "Profesia Movado" (gazeto dusemajna), organo de Profsindikatoj en BSSR, estis presitaj = 8 fotografaĵoj.

SAT-ano 603

Samara. Nuntempe por preparado al memorvespero de 14. aprilo (morto de Zamenhof) estas elektita speciala komisiono, kiu ellaboris planon de sia laboro. Programo de la vespero estas jena: teatraĵo, ekspozicioj, murgazeto, raportoj kun oficiala parto. Ĝis la vespero en la ĉeletoj de SEU estos starigitaj raportoj pri Zamenhof. Fundamenta deziro de tuta ĉi-tiu laboro estas: ĉiuj aliĝu al SEU kaj SAT.

En la urbo ankoraŭ estas malfermitaj tri novaj rondetoj: en la regimento de ligistoj (por ruĝarmeanoj) el du grupoj — 50 pers., en la lernejo je la nomo L. Tolstoj (por lernantoj) — 23 p., kaj en la lernejo por plenaĝuloj — N I — 50 p.

En la urbo estas nun 13 rondetoj. La postuloj por malfermadoj de rondetoj estas grandegaj, sed nesufiĉas gvidantoj.

Fundamentaj lernolibroj estas: "Fundamentoj" — de Lidin, "Petro" kaj ĵurnalo "Intern. Lingvo".

Sovetio, Samara, Sovetskaja 135.

Kuĥarskij, n-o 5913

Stalingrad. De 9. 1. ĝis 13. 2. k-do Lingel prelegis 22 lekciojn en diversaj profunuiĝoj kaj lernejoj pri la lingvo Esperanto, ĝia deveno, disvolviĝo, signifo kaj facileco de ellernado. Rezulte dume estas aranĝitaj kvin rondetoj en lernejoj: de Dobrolubov 96 lernantoj; de Belinskij 74; de Marks 69; de Pirogov 77; de Ŝiler 62; entute 378 lernantoj, inter kiuj estas kelke da geinstruistoj kaj profunuiĝanoj. Estas organizitaj ankaŭ 2 novaj grupoj en lernejoj de Bebel kaj Bilejev. Gvidas ĉiujn grupojn k-do Lingel (SAT-ano 5087). Kursoj trimonataj. *Lingel.*

Urjenj. 20. decembro 1925 estis kunveno de moskvaj instruistoj-esperantistoj. Unue raporto de A. Saĥarov pri rilato de Esperanto al lernejo, kaj poste debatoj pri tiu ĉi demando, oni decidis: 1. Organizi en centra domo de l' instruistaj laboristoj sekcion de instruistoj-esperantistoj kaj konduki laboron laŭ du linioj: propagandaj raportoj kaj en rondeto ellernadi lingvon Esperanto. 2. Klopodi ĉe moskva fako de popola instruado trans CK SEU pri farado de oficiala eksperimento instrui lingvon Esperanto en unu el lernejoj de moskva fako de popola instruado.

Por plenumo de ĉi decido estis elektitaj specialaj komisionoj.

Suvorov Leonido (Urjenj), 5402

Korekto

En la parto "Kroniko" eniĝis sufiĉe granda eraro. Nia societo ricevis *15 milionojn* kaj ne 15000 hung. kronojn de la urbestraro de Budapest. *Hungaro.*

LA MARTA N-RO DE "SENNACIECA REVUO" ELIROS LA 6. APRILO

Int. Esp. Kolektanto- kaj Korespondo-Klubo

"AMIKECO"

Fondiĝis 1924. Propra organo monata.
Jarabono 1 U. S.-dolaro.
Kiu aliĝos ĝis 1. 5. 1926, pagos nur ½ U. S.-dolaro aŭ ties valoron.
Postulu prospekton de prezidanto:

J. Groebel, Eltzerhofstr. 5, Koblenz, Germ.

Germanlingvaj Prolet-esperantistoj!!

Propagandu por Esperanto kaj por SAT per nia flugfolio-afiŝeto (2. Eldono)

Mendu kaj uzu grandkvante por disvastigi nian movadon!


Havebla ĉe k-do **H. Muravkin, Berlin-Charlottenburg, 5,** Horstweg 38, II. Poŝtĉekkonto: E. Murawkin, Berlin 148098

* *

Prezo, inkluzive afranko en germ. mk. (antaŭa pago)

1000 ekz.,	Germ., Aŭstr.	13.20	aliaj landoj 17.10
500 „	„ „	6.80	„ „ 8.60
100 „	„ „	1.50	„ „ 1.75
10 „	„ „	0.17	„ „ 0.22

Sennacieca Asocia Tutmonda ☆ Eldona Fako Kooperativa



Henri Barbusse: **Eklumo en la Abismo.** I. Finiĝo de unu mondo. II. La Ribelo de la Prudento. III. Klareco. **Prezo:** broŝ. 0,80 mk. g. 96 paĝoj.



Dokumentoj de Komunismo 132 paĝoj, broŝurita **Prezo:** 1.— mk. g.



Tri Verkoj de Tolstoj El rusa lingvo traduk. J. M. I. Patriotismo kaj registaro. II. Al politikistoj. III. Pensoj pri edukado kaj instruado. — 78 paĝoj. **Prezo:** 0,80 mk. g.

Aĉetebla ĉe Administracio de SAT

Rich. Lerchner, Leipzig O 27, Colmstrasse 1 (Germ.)

Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG